





■ RUFEGON :

**MANLIBRO
DE NOVA HOMO**

LA JUNA PENSO

La Juna Penso

F 47340 Laroque Timbaut
121A * 1978 * 1,5 FF



"Ĉar ĉiuj povas kompreni,
sed ne ĉiuj tion deziras,
oni adresas ĉi tiujn paragrafojn
al tiuj, kiuj kompreni deziras ."

En la sama serio: "Eduko kaj vivsignifo" de
Jiddu Krishnamurti.

M A N L I B R O

D E

N O V A

H O M O

Enkonduko

Tiujn paĝojn subskribis pseŭdonomo, tial ke ili ne havas aŭtoron. Ties esenco fontas el la mensa mondo de la nova homaro, el tiu energio, kiu kanaligos en ĉiu el ni: en la nova homo.

Tiuj vortoj estis skribataj dum inspir-momentoj, kiuj ĉiam okazis samtempe kiel stato de malstreĉo kaj de atento (serena atentemo). Oni legu ilin paragrafon post paragrafo, kaj ne unu plian ĉiufoje. Aŭ enlitiĝante aŭ ellitiĝante, aŭ en ambaŭ tiuj okazoj. Oni memoru, ke la vortoj ne gravas per si mem. Pro tio, "tiuj, kiuj volas kompreni", legos inter la vortoj, kaj sukcesos vidi la lumon, kiun ili kaŝas malgraŭ sia klopodo ĝin montri.

Pli gravas agi laŭ ununura paragrafo aŭ numero, ol legi dekfoje la manlibron.

Ĉefas pensi, ke la libro parolas al ni mem, kaj ke ĉiu de ĝi dirita vorto rilatas kun la hodiaŭaj eventoj, kiel ajn gravaj aŭ banalaj ni konsideras ilin.

Se okazos komentoj inter du personoj aŭ en grupo, oni memoru, ke tio ĉi povos helpi por klarigi dubojn sed la "ekpraktikigo" de la manlibro estas ĉies individua tasko, ĉiuloke kaj ĉiumomente.

1. Esti, esti kaj fari

Lerni kio estas la silenta senfaro. Scii kio reale plaĉas al ni. Ne voli esti heroo. Simpligi la ideojn, proksimiĝi al la lumo. Sereni por kompreni kaj akcepti la aliajn tiaj, kiaj ili estas.

Esti totale libera. Forta por esti atentema, sobra por esti forta, nelacigebla en la trankvila provo vidi, kuraĝa por akcepti la neeviteblan vivdoloron, neŝancelebla por detruiri la deziron sin lasi trompi.

Ni faru ĉieleron por ni sur la tero. NUN.

2. Diri

Eble oni parolis al vi kun sinceraj intencoj, sed ĉio al vi dirita estas absolutaj mensogoj. Mensogoj, kiuj postvivis per ripeto de homo al homo, longe de l' jar-miloj.

Transiri ĉion ĉi, sen tuŝi ĝin, sen ĝin menci.

Superflugu ĉion ĉi kun la okuloj direktitaj ĉirkaŭ vin kaj en vin mem, sen rigardi suben.

Rekomencu.

Vi faru ĝin, vi diru ĝin. Nur vi pensu ĝin. Ne kredu tiujn, kiuj diras ke vi ne kapablas aŭ frenezas.

Rekomencu. Ne konsentu kun la plej eta ripozo sur tiu vojo al la MARŜO.

3. Forto kaj espero

La forto de l'homo estas ties psikofizika energio, kiu ebligas la nepre necesan, ĉiumomentan atenton (kiu ne estas analizado) al la ekstera kaj interna vivo. La malforto de l'homo estas la persekutado de distriloj, ekscitiloj kaj stimuloj ĉiam pli multnombraj. Ĝi estas la paŭzo en lia MARŜO.

La espero de l'nova homo estas liberiĝi el la akiraĵoj, el la akiremo kaj sperto de l'malnova homo, el la militoj de l'malnova homo (en ĉiuspecaj konfliktoj: la tutmondaj, la naciaj, la familiaj aŭ la ĉiutagaj, propraj al la individuo).

La sola aŭtenta homa espero estas ĉion denove rekomenci. Ankoraŭ kuraĝi senespere.

4. Vortoj

Ne plu da argumentoj, ne plu da intelektaj diskutadoj. Ne plu da banalaj kaj stereotipaj konversacioj. Necesas tre atenti por ne menciigi eĉ nur tion malnovan, por ne implikiĝi en tio malnova eĉ nur parole.

Malrapida parolo, kun homeca ritmo, ne kun la ritmo de la vin ĉirkaŭantaj maŝinoj. Afabla parolo. Vi atakas nenion, tial ke vi akceptas ilin ĉiujn tiajn, kiajn ili estas, kio estas la plej bona maniero ebligi al ili ŝanĝiĝi. Jam por ili vi nenion pli povas fari. Kaj nenion malpli. Akcepti ilin. La ŝanĝiĝo estas ĉies propra afero. La ŝanĝiĝo disigas vin de neniu. Ĝi unuigas vin al ĉiuj.

Akceptante vian amikon tia, kia li estas, vi ebligas al li sinceri. Esti la sama. Kaj neniu povas transformiĝi, se li antaŭe ne scias kiu li estas kaj kia li estas. La strebado de socia valoro ne estas, ke oni aŭskultigu sin, sed ke oni sciu resti eĉ malgraŭ si mem en la kreviva silento.

5. Energio

Malmulta nutraĵo. Nutraĵo malpli prilaborita kaj pli natura. Multe da sereno. La tuta ĝojo, kiu ŝprucas al vi neserĉite. Ne pensu, krom pri tio, kio okazas ĉi-momente, kion vi faras ĉi-momente, kion oni diras al vi ĉi-momente. Vivu tie ĉi kaj nun. Nelacigeble ekzercigu en la malfacilega arto de l'afabla silento. Tiel vi kolektos la vastan energion, kiun vi bezonas por plene ekkonscii pri kio okazas. De momento al momento (ĉi-momente).

6. Transmutacio

En la totala krizo regata de plena konfuzo, ĉiu vero trans ŝanĝiĝis por servi la ruzulojn. La ruzulo, t.e. la malnova homo. Tiu, kiu scias kontentigi siajn dezirojn, kiuj ajn ili estas.

La nova homo estas inteligenta. La nova homo komprenas. La nova mondo estas tiu de la komprenemo, kaj en ĝi ne estas loko por la malnova ruzo, kiu velkas kaj mortas, tial ke ruzo tanĝentas la realon. En la nova mondo la realaĵojn oni ne transŝanĝas. Ilin oni alfrontas kaj komprenas. Trans la doloro kaj la plezuro. Trans la indivi-

duaj aŭ kolektivaj deziroj, grandaj aŭ malgrandaj. La nova homo **KOMPRENAS** ĉiun veron, tial ke nur la sincera inteligento trairas la medolon de la vero. Ĉi ignoras kun ĝoja trankvilo la interrompojn de sia vojo. La nova homo bezonas lerni esti sola kaj trista en la centro de l'realo. La nova homo bezonas lerni esti sola kaj ĝoja en la seninterrompa silento de l'realo. Kaj ekde tiu soleco, kiun malfacilas nomi soleco, oni aŭdas la komuniĝon kun si mem, kun la aliaj homoj, kaj kun ĉio.

7. Laboro kaj gajigo

Kiam el Religio, Politiko, Laboro, Tekniko, Scienco, Psikologio, Ekonomio, gajigo kaj Amikeco, ni estos farintaj solan kaj saman aferon, tiam ni estos farintaj la plej decidan paŝon por elimini la kreskantajn konfuzon kaj konfliktojn sur nia Planedo. Reale rigardi la tagan aŭ noktan gloron de la ĉielo aŭ la belon de vizaĝo, aŭ fari ion ajn, tiumomente forgesante ĉion alian, kio ni estis aŭ kion ni faris, tio estas fari kraketantan fajron el ĉiu vivmomento. La ĝoje plenumita laboro, kiel konstanta gajiĝo, estos nepre bone realigita laboro, kaj tio estas la plej pura kaj plej honesta politiko, la plej bona menshigieno, tial ke ĝi apartenas al ĉiu momento kaj al la eterno mem. Rigardi, labori, aŭskulti, vojiri, tiel vivi ĉiumomente kaj nenial konsenti vivi alimaniere, tio estas la plej bona kontribuo al la planed-ekonomio, al la korpa kaj mensa sano, al la mond harmonio, kiu estas la lasta reflektado de nia propra harmonio.

Ni estu necedemaj kun ni mem, por ne malhelpi al ni vivi laŭ tiu fleksa, malstreĉa, malferma kaj viva maniero. Ni esperas eliĝi el la laboro por amuziĝi aŭ por politi kumi, dum amuziĝo kaj politiko situas en la sama momento, kiam ni plene laboras.

Se nia laboro ne povas esti tia, refreŝiga kaj totala, tio signifas, ke ni devas ŝanĝi ĝin.

Se niaj rilatoj ne estas mistikaj, refreŝigaj (kio ne signifas distraĵ) sanigaj, harmoniaj, amikaj, ĉefas, ke ni metu nian esencon fronte al la spegulo ĉar mankas al ni mistiko, amuzo, sano, harmonio kaj amo, tial ke ni estas konfuzaj kaj konfliktantaj.

Distro estas alia provo momente fuĝi el realo, kiun ni ial tute ne ŝatas.

Refreŝiĝo, tio estas ĉiumomente alfronti la realon laŭ totala kaj kohera maniero, tio estas senĉese krei kaj sekve emo kaj malemo ne havas enhavon. Tio, kion ni faras aŭ kio ni estas ne povas esti plaĉa aŭ malplaĉa, tial ke tio ĉiumomente brulas en la sankta fajro de unika kaj kompleta vivo. Refreŝiga vivo.

8. Helpo

Kiam vi sentas en vi la emon helpi, ekhaltu. Tre probable, ke via intenco fontas al malklara sento de super-eco. Vi estas la "donanto"; la alia, la subtile males-
timata, "ricevas". En la intenca helpo, estas vasta "spaco" inter vi, kaj tiu kiun vi helpas.

Kiam vi sentas vin egala al ĉiuj kaj estas amo, tiam aperas helpo, kiun vi ne serĉis, kiu ne havas objekton kaj kiun vi eĉ ne pensas nomi "helpo".

En tiu foresto de "spaco", kiu senvole sekvas inter ve-
raj amikoj, aperas la sennoma helpo, kiu ne estas serĉ-
ata, nek petata nek donata. Senspaca helpo kaj senpaŭza.

9. Por la temoj

La astroj, homoj, nutraĵoj, radiadoj, ideoj, horloĝo, mono, mil aferoj influas nin, t.e. ĝojigas aŭ malĝoj-
igas nin, ekzaltas aŭ deprimas nin, donas al ni vivon kaj sanon aŭ malsanon kaj morton. Sed estas stato de nia esto en kiu ni estas liberaj de ĉio ĉi. Kiam ni dependas plu nek de l'pasinto nek de l'estonto. Kiam nek la pro-
jektoj nek la memoroj plu impresas nin (kvankam ili ek-
zistas). Tiu stato, en kiu la tempo ne ekzistas. Kiam ni saltas vivoplenaj, subite kaj ekstertempe al la eterno. Tiam ni estas liberaj de la kosmo, de l'viroj kaj vir-
inoj, de l'ideoj kaj de l'aĵoj.

Tiam ni estas UNU kun ĉio ĉi kaj samtempe plenigas nin la senpaŭza malpleno de l'ĝojo, profunda kaj vibranta totala sendependeco.

10. Aktiviĝi

Kunu sen perdi vian propran eston. Akceptu la aliajn, totale, sen serĉi kialojn. Surprizu tiujn ĉirkaŭ vi per neatenditaj teneraĵoj. Ridetu.

Rigardu la horloĝon, sed liberigu la menson el la tempo.

Eniru en vian domon, ne zorgante ĉu ĝi estas via. Ne estu granda stomako, centro de ĉio kaj ĉiam preta ricevi laŭdon, famon, gajnon, ĝojon, eĉ amon, pasive. Aktivigu vin. Vi povas fari tion sola. Vi absolute kapablas. Vi fortas. Ne tretu vian latentan potencon per la suker-glua forlasiĝo al ĉi tiu civilizo, kiu nin detruas subtile kaj nin distras krude, per la ĵurnalo, la televido, la radio, la hasta kaj malagrabla laboro, la modo (la lasta vestaĵo, la lasta aparato, la lasta veturilo), la varia, grandkvanta kaj ege miskvalita nutraĵo, same kiel literaturo.

Vi povas malhavi tiujn falsajn bezonojn. Vi kapablas. Ne permesu, ke oni tretu tiun lumon ene de vi mem, lumon, kiu ne elektas, ne analizas, ne interpretas, ne akumulas. Sen paŭzo.

11. Mallumo kaj distro

La mallumo, kiu pulsas ene de vi, estas profunda kaj malnova. Ekde via naskiĝo ĝi kreskas kun vi kaj eble de antaŭ multe pli longe.

La mallumo, kiu vin ĉirkaŭas, kvankam ofte lumaspekta, apud tiu, kiu restas en vi, estas en daŭra blinda ekspansio por invadi kaj kaŝi la lumon ardantan en via est esenco.

Tial unusola minuto de distro ekvivalentas multe da tempo de mallumo. Ne distriĝu. Vigle rimarku daŭre, ĉiumomente. OBSERVU trankvile ĉiun voĉon, ĉiun sonon, ĉiun silenton. Ĉion ĉi, kio vin ĉirkaŭas ĉiumomente. Vi vidus mem, kaj nur vi mem, kiel ĉio iras partopreni vian internan lumon, esencan kaj ĉiaman.

12. Bonfarto kaj Instruistoj

Pleje gravas, ke vi bonfartu en la intimeco de via esto. Vi bezonas spontanajn kaj malstreĉajn atenton, trankvilajn kaj daŭran viglon por identigi tion, kio vere kontraŭas vian realan kaj profundan bonfarton. Tio estas unu el la plej firmaj bazoj de bonfarto por ĉiuj, kiuj ĉirkaŭas vin.

Ne cedante en via ĉiuminuta kontemplo, vi ne povos erari. Vi ne bezonas iun, kiu vidigos vin. Vi ne bezonas instruistojn nek konsilantojn aŭ konsilistojn. Ne atendu alvenon de via forto el la ekstero. Vi povas fari tion. Vi absolute kapablas. Ne kredu tiun, kiu diras, ke

vi malfortas à malsaĝas. Saltu jam tuj. Frakasu vian koron, viajn manojn kaj cerbon por rekonstrui ilin laŭ via propra maniero. Ne dubu. Ne argumentu. Komencu vivi iam vian propran vivon. Katoj, milionuloj, agrabla laboro, silenta mallaboro, la vento, la almozuloj, viaj amikoj, la luno, la rideto, inter pluraj aliaj aferoj, estos viaj instruistoj. Vi mem vidos. Se vi malfermas viajn okulojn, vian propran menson kaj vian koron, vi ne bezonos interrompi vekiĝon.

13. Intelekta interpreto

Ĉi tiuj vortoj, kiel ĉio ajn ekzistanta, povas havi egan signifon por tiu, kiu vere malfermis la okulojn kaj bone maldormas mense kaj kore. Ĉi tiuj samaj vortoj, elektitaj, memorigitaj, à nure interpretitaj per la intelekto, malhavas ĉian valoron.

Ne analizu ĉi tiujn paragrafojn. Komprenu subite ilian lastesencon. Eĉ kiu ne legas ĉi tiujn vortojn sed malfermis la seninterrompan kaj profundan torenton de malstreĉa viglo, tiu kapablas kompreni.

Sed bonvenigu ĉi tiujn vortojn, se ili utilas por senvestigo de via lumo.

Trankvile, per interna rideto, rigardu ĉion; vi vidos kiun lokon vi okupas en la ega kuntutaĵo kaj ŝpruĉos tiel esenc-ago, via vera ago, kiu ne estas vulgara aktiveco surfaca kaj portempa.

14. Jam tuj

Vi deziras komenci denove vian tutan vivon. Do vi ne atendu plu. Vi kapablas tiom, kiom kiu ajn alia homo. Malpliigu vian manĝporcion je la duono. Tiom sufiĉas. Via manĝo estu natura. Piede iru duoble.

Faru ion per viaj manoj. Frakasu ĉion, kionvia cerbo produktas kaj rekonstruu tion tute nova.

Parolu kiel eble plej malmulte, kaj ne pri vi mem kaj pri la privata vivo de la aliaj. Ne enmiksiĝu en la vivon de tiuj, kiuj vin ĉirkaŭas. Vivu vian propran vivon. Lasu ĉiun vivi sian propran vivon. Vi posedas neniun. Neniu posedas vin.

Amo ne fordonas rajtojn nek devojn.

Aŭskultu ĉiujn, ne nur per la oreloj, sed ankaŭ per la sentoj, se vi ne permesis tiun turpan civilizon detrui

ilin tute (kaj la orelojn kaj la sentojn). Ofte rigardu solece la larĝan linion, kie tero unuiĝas kun la ĉielo; tiel vi ne forgesos, ke ankoraŭ eblas tia unuiĝo. Ne strebu vidi ion. Rigardu atente kaj spontane ĉion ŝprucantan en ĉiu el viaj momentoj. Ne strebu aŭskulti ion. Aŭskultu trankvile, ne partoprenante la konfuzon, la klaĉon, la bruon kaj la teruran frivolecon, kiuj ĉirkaŭas vin.

Ankaŭ silento povas kuraci vin.

Pripensu ĉu ĉio, kion vi posedas, nepre necesas por pluvivado. Pripensu kial vi ne kapblas ĝui per la simpla satigo de viaj bezonoj.

Pensu iam tre serioze ĉu io el tio, kion vi faras (aŭ la maniero kiel vi faras tion) ne estas detruanta vian trankvilon aŭ vian ĝojon. Memoru, ke viaj trankvilo kaj ĝukapablo estas tre gravaj por la bonfarto de tiuj ĉirkaŭantaj vin.

Akceptu ĉiujn tiaj, kiaj ili estas; ne pretendu transformi iun ajn, sed ne timu malsimili ilin. Ne serĉu kialojn por ĝoji esti viva. Komencu ĉion denove. Kie komenci, se ne per vi mem?

Antaŭen! Vi povas fari tion. Vi povas fari tion. Ne argumentu. En la venonta minuto vi povas esti nova homo. Saltu! Jam tuj!

15. Konfuzo kaj konsiloj

Ni plurfoje aŭskultis similajn aŭ samajn konsilojn kiel jena: "Vidu kiel la monstroj preplatigas la kapojn unu la aliajn! Kiel ili sin manĝegas reciproke! Neniam estu kiel la monstroj, kaj kiam vi vidos unu el ili, preplatigu ĝian kapon kaj formanĝu ĝin!"

Konfuzo estas plurforma. Ĝi povas preni ĉiun ajn aspekton. Nur la lumo, kiu pulsas ene de vi mem, senmaskigite nur de vi mem en ununura kurag-momento, povas identigi la konfuz-esencon kaj ĝiajn multoblajn ŝajnojn. Jam tro estas dirite por riĉigi konfuzon. Restas nur sin turni senkomplete al la silento. Nur sendependa homo povas ami. Tial, por ami vian familion, sendependiĝu de ĝi. Por ami edz(in)on, sendependiĝu de li (ŝi). Nur libera homo kapablas scii. Por scii, liberiĝu de ĉiu ĉirkaŭmuro, ĉiu doktrino, ĉiu ajn institucio.

Konfuzituloj nomas "fanatiko", "frenezo", kaj tiel plu,

la agon (aŭ la neagon) esencan kaj la penson (aŭ ĝi-an mankon), kiu estas la esenco de vivo sana, ĝoja kaj vera.

16. Nenial

Vivo estas io kvazaŭ miraklo. Ĉiu sekundo de via vivo estas preskaŭ nekredbla mirindaĵo. Ĉi tiu sama sekundo estas nutrita de via lumo, vidita (aŭ ne) de vi. Ne alia sekundo. Ĉi tiu sama momento. Vivu ĝin. Ne mortigu ĝin per sonoj kaj paroloj. Ne mallumigu ĝin per pasinto nek estonto. Ne mallumigu ĝin eĉ per lumo. Nenial perdu la oportunon vivi ĉi tiun momenton. Lumigu vin. Renaskiĝu. Vi absolute kapablas fari tion. Ĉi tie mem. Ne lasu ununuran sekundon malplena laŭ via luma vojo al la lumo.

17. Similoj

La malnova homo havas la samajn kapablojn kiel vi. La saman potenc-energion, preskaŭ la saman baz-strukturon. Sed li platpremias ĉion ĉi en ĉiu sekundo per la distroj de la realo, per la atentomanko, akceptinte sen duboj la regulojn kaj la moralon, persistigante la absurdan pasinton, limigante la spacon, limigante la tempon, limigante sin. Ne lasu morti tion, kio estas ene de vi. Permesu ĝin kreski. Mortu jam tuj. Dumvive. Renaskiĝu en la venonta momento. Kaj en ĉiu sekundo de via nova vivo, vivigu tutan vian potencon. Lumigu vin. Larĝigu vian esencon.

18. Kulpoj kaj komplikeco

Ne sentiĝu kulpa. Komencu ĉion denove kiel en renaskiĝo. Aŭskultu atente la malnovan homon. Komprenu kion li diras. Per via nova menso veka kaj trankvila, vi povos morti tute al tio, kion li diras, kaj ne kompliki en tio, kion li faras.

Ne serĉu pretekstojn kaj kialojn por pravigi vin. Ne haltu per ruzaĵ argumentoj kaj intelektecaj konversacioj, dum viaj agoj daŭre restas malnovaj. Ne estas alia helpo ol salteti la grandan salton kaj esti totala homo.

Kaj homo tute nova. Jam tuj. Sen respekti vian doloron. Super la doloro.

19. Malnova homo

Malnova homo estas kiom ajn aĝa. Li enkestigis la tempon kaj disdividis la teron kaj la mondon. Li havas fiksjajn regulojn, fiksan moralon (kvankam li ne respektas ĝin), difinitan eklezion, aŭ ion anstataŭantan ĝin, sciante aŭ ne pri kio temas religio aŭ religieco, difinitan politikpartion, viv-asekuron, enuan laboron kaj, dezirante asecuri sian vivon, li vivas duon-morta. Li lernas morti kaj mortigi, li militas kiam indikite, sed li ne scias kio estas vivo, malofte oni parolis serioze al li pri ĝi. Li malamas silenton kaj kvieton, tial ke ili montras al li lian veran vizaĝon. Li timas vidi sin tia, kia li estas, ĉar li timas ankoraŭ pli la eblecon tute transformiĝi de unu momento al la alia, alfrontante doloron sen respekti ĝin. Li donas kiam oni donas al li. Li ridetas kiam oni ridetas al li. Li amas kiam oni amas al li. Li distras sin per konsumado: novaj vestoj, televido amasigita, ĵurnaloj, sensencaj konversacioj, la hodiaŭ nomata "politik-agado", kinejo kaj psikoanalizo se li povas ĝin pagi. Li prokrastas. Li kredas komforti. Kvankam li estas terure malfeliĉa kaj malkontentus sekrete.

20. Vi mem

Foriru, rigardu la okulojn de ĉiuj, kiuj kunuzas vian destinon vivi kaj morti. Se vi ne cedas en via malstreĉa, senpaŭza atentemo, vi povos identigi eĉ en gracila knabino la malnovan putrantan homon. Akceptu tion kaj daŭrigu vian vojon. Vi ne estas heroo nek deziras esti, jam sufiĉas da ili; kaj vi ne pretendas transformi iun nek enmiksiĝi. Sed en vi funkcias la regenerado de la tuta homaro por ĉiuj jarcentoj. Sufiĉas jesi la saĝon. Subite esti la sama, kun la sama nomo, sed esti nova.

Vi mem.

21. Vekiĝo

Vekiĝu. Vi duondormas pro ĉiutagaj aŭ ĉiusemajnaj distroj. Pro vanaj paroloj. Pro la bruo. Per via luma cerbo vi komprenas en ununura momento kien iras malnova homo. Per tiu sama lumo vi vidas la urĝan neceson renversi viajn parolojn kaj agojn ĉiumomentajn. Sendube vi trovos ankaŭ la serenajn forton, sen timo, por ke via

transformiĝo estu stabila. Vi lasos en vi neniun ĉen-
eron de la pasinteca ĉeno. Nek vian landon nek vian
nomon, se necese, por detruĝi la ĉirkaŭmurojn, la bom-
bojn kaj la mort-persvadojn.

Vi faros ĉirkaŭ vi iom post iom la novan mondon, tiun
ĉiumomente konstruatatan sed eble neniam vidatan, plenan
de vivo, apud la malnova homo, eĉ sen lia helpo, ĉar
via nova lumo tiom fortigis vin, ke vi neniam plu po-
vos kredi, ke vi naskiĝis malforta kaj ke vi ne povos
fari ĉielon en la tero.

Ne atendu, ke komencu via frato, via kunulo, via filo,
via edzo, via instruisto.

Pensu tion vi mem. Parolu tion vi mem. Faru tion vi
mem. Urgas ke renaskiĝu en vi mem ĉiumomente la novaj
homoj de la tuta historio. Urgas la oportuna morto de
ĉiuj malnovaj homoj, kiuj ŝprucas surprize el via pro-
pra esto.

22. La komenco kaj la fino

Diskonigu ĉi tiujn vortojn diktitajn de interna lumo.
Multobligu ilin per ilia sama muziko. Komencu fari
tion. Diru ilin denove per ilia sama senco, en via pro-
pra lingvo. Eĉ silente. Forlasu la frazojn diritajn
nur por plenigi minutojn.

Forlasu la stereotipajn aŭ aŭtomatajn agojn.

Ĉi tiuj vortoj ne estas konsiloj nek diktas regulojn.
Ili lasas vin tute libera por ke per via atento vi
malkovru la tutan veron, kiu vin ĉirkaŭas kaj kiun vi
malestimas senscie.

Simple komprenu, ke vi duondormas kaj tio estos la ko-
menco kaj la fino de vekigo. Rimarki kion oni faras eĉ
se oni nomas tion "malgrandaĵoj".

Rimarki malstreĉe. Ĉiumomente. TUJ NUN.

23. Sufiĉas tio

Necesas firmeco, forto kaj flekseblo. Sed ne por elteni
pli bone ĉi tiun situacion de plezurserĉa komforto, de
absurda ekscito, de bruo, de sensignifaj konversacioj,
de prema konkuro.

La forto uzata por adapti nin jam plenumis sian celon.
Ĝi produktis la malnovan homon. Rigardu lin per okuloj
lumigataj de serenatento. Sufiĉas tio. Aŭskultu lin
atente. Sufiĉas tio por malkovri la novan signifon, kiun

havas via forto. Senigi sin. Malstreĉiĝi. Salti. Plonĝi en la silenton sen komati sin. Igi grandan renverson al via penso kaj komunaj aktivecoj de ĉiu momento. Komenci denove. Eliri el la ruboj de la pasinto ĝis la malestimata lumo de la estanto. Sufiĉas tio.

24. La sojlo

Oni diras al vi por kio vi utilas, por kio vi estas en la mondo, kion vi devas fari kaj kial vi devas ĝui. Sed tion devas pensi kaj decidi nur vi mem. Vi povas fari tion. Ne timu. Liberigu de aĵoj, konsiloj, radio, ĵurnaloj, televido, kaj de ĉia afero, kiu parolos al vi pri tio, kion faras aliaj personoj (klačoj kaj novaĵoj) kaj kion vi devas fari (konsiloj, propagando, ktp). Forlasu la bruon. Detruu la limojn de spaco kaj tempo. De la mensa tempo, pli ol de horloĝa tempo. Ne enmiksiĝu en la vivon de aliaj, kiu estas ĉiu vivo pulsanta ekster via haŭto.

Malpermesu malstreĉe, ke oni enmiksiĝu en vian propran vivon. Vi estas libera. Vivu vian liberon kiel eble plej totale. Komunio estas de novuloj. Enmiksiĝo estas de malnovuloj.

Lasu vivi la liberon de aliaj. Ne akceptu argumentojn malnovajn nek ripetitajn konsilojn, kiuj pretendas mildigi tiun nediskuteblan grandan veron, kiu estas nur la sojlo de la lumpordego.

25. La korpo

Vi forlasis ĉion interferantan kun la aktiveco de via korpo kaj de via menso: alkoholo, tabako kaj aliaj drogoj, troa manĝaĵo, signifikaj babiladoj, troa sono kaj kaj tio, kion vi mem malkovris. Sed ĉi tiu estas nur eta parto de la ŝanĝ-procezo. Ne haltu pro la penoj postulataj de la etaj rezignoj. Ne estu peno. Malstreĉiĝu. Ne haltu en la unua eta paŝo, liberigi vian korpon. Lumo oceano ja atendas vin. Saltu el via mallumo. Ĵetu vin en la nenion.

26. Ekzemploj

Ne petu ekzemplojn de novaj homoj. Ĉiu ekzemplo limigas la problemon aŭ ĝis misformas. Vi rekonos la novajn homojn ĉirkaŭ vi kaj eĉ tiujn mortintajn, kiam vi mem

estos tia. Hodiaù. Komprenu entute. Malfermu vian menson serene kaj kuraĝe al la lumo. Ne respektu vian malĝojon kaj vian doloron. Ne respektu ilin. Ne vivu alies vivon. Ne vivu "jam uzitan" vivon. Mortu por la klaĉoj. Vivu vian propran vivon. Pensi pri alies privata vivo estas morti vian propran vivon.

Ekzemploj povas esti nur malnovaj. Hieraù nova homo hodiaù estas malnova. Ne povas ekzisti ekzemplo, kiu ne apartenas al la pasinto, eĉ se ĝi ŝprucis nur el via penso. Ne petu ekzemplojn. Petu nenion. Donu vin trankvile. Pensu tion per vi mem. Faru tion vi mem. Decidu vi mem. NUN. Vi komprenos sen paroloj.

27. La bano

Akvo banas la korpon. Ankaù silento banas. Havu ĉiusemajne (se eble ĉiutage) kelkhoran banon el silento. Tute sola kaj senhava.

Sen libroj, sen vortoj, sen amikoj, sen mono, sen malamikoj, sen laboro, sen mallaboro, sen maŝinoj kaj iaj aparatoj. Sen interna bruoj, kaj, se eble, sen ekstera bruoj. Tute libera. Superverŝu silenton ĉiudimanĉe ekde la tagiĝo aŭ la merkredojn ekde la vesperiĝo. Kiam vi deziras. Sed decidu.

Havu tian banon, kiu, kompare kun akvobano, tiom gravas aŭ eĉ pli. Superverŝu silenton kaj lumon. Vi mem komprenos.

28. Ne

Nova homo ne deziras ŝanĝon. Li iras pli profunden. Li realigas ĝin. Li diras "ne" simple kaj afable al ĉio, kio lin ĉirkaŭas kaj detruis la malnovan homon. Sen iu regulo, sen serĉi ekzemplojn kaj sen la intenco ekzempli, li realigas la ŝanĝon en si mem subite. Serene. Estas silenta eksplodo en la menso de nova homo. Estas fleksebla firmeco, kaj paco kaj ĝojo, kiuj alvenis ĉar ili ne estis serĉataj per la multoblaj kaj turpaj manieroj uzataj de malnova homo.

29. Agado

Ne gravas tio, kion vi faras. Sed ke ĝi plaĉu al vi. En la rutino mem povas esti tio nova, se vi jam okazigis la necesan internan turnegon, la esencan mensosalton.

Vivu ĉiun sekundon intense, t.e. atente. Sen strebo. Serene. Ne izolu vin. Alproksimiĝu al ĉiuj kaj akceptu ilin tiaj, kiaj ili estas, sed vi plu vivu novmaniere inter ili.

Ne timu esti malsimila. Ne timu esti egala. Ne timu. Antaŭen. Saltu!

30. Alkroĉiĝo

Oni vin vundis. Kial vi sentas vin vundita? Oni ne dan-
kis vin. Kial vi esperas dankemon? Vi malsukcesis. Kial
vi ĉiam esperas iun rezulton de tio, kion vi faras?
Eble ĉar ne plaĉas al vi tio, kion vi faras en la mo-
mento kiam vi faras ĝin?

Ne alkroĉiĝu al la laboro. Akceptu kaj ĝuu ĝin. Kvazaŭ
infano kun sia ludilo.

Ne alkroĉiĝu al la personoj. Akceptu ilin kaj ĝuu kun
ili. Ne alkroĉiĝu al la ideoj. Ne akceptu ilin. Ne neu
ilin. Flugu tre alte super ili.

31. La graveco de la aferoj

Ĉiuj aferoj gravas se ili konsciigas kaj vekas nin. Kaj
ĉiuj aferoj estas vivataj nur post la vekigo. Se vi ne
vekiĝas komplete, vi ne povos eĉ memori viajn songojn
komplete.

Ĉio, kio nin dormigas aŭ nin fortiras el kio, kio oka-
zas ĉi tie kaj nun (kaj ne nur el tio, kion ni okaz-
igas) detruas tion plej noblan kaj subtilan, tion plej
esencan de la homo.

Ĉiu problemo ne alfrontita malstreĉe kaj atente alpor-
tas mallumon, t.e. ĉiamigon de la problemo. Ne konsen-
tu diskutojn, banalajn konversaciojn, klaĉojn, mokojn,
intelektajn kunsidojn.

Entuta kompreno igos vin rimarki realojn, kiujn vi
unue ne povos elteni, ĉar la koro estas pli malrapida
ol la nervsistemo. Ĉar vi estas konstruita el mensogoj
kaj konsiloj, el opinioj kaj informiteco, el klaĉoj
kaj novaĵoj, el ekscito kaj bruo. Ĉar vi ne kreskis
kun ĉiu vero. Sed ne fermu la okulojn. Atendu malstre-
ĉe ĝis la lumo invados ankaŭ la koron.

32. Konfuzo - Nescio - Stulto

La plej konfuza homo kapablas sinteni saĝlumece: per
neagado.

La plej nescia homo kapablas diri la tri plej saĝajn vortojn (t.e. tiujn, kiujn li plej bone konas):

Mi ne scias.

La plej stulta homo ĉesas stulti, kiam li komprenas la egan valoron de stultaĵo.

33. Post la komenco

Ĉi tiu nova totala agado ne taŭgas por vi. Por tiu ero via konstruita el informaĵo kaj opinioj. Vi serĉas do iun fragmentan aktivecon por rekomenci la cirklon de l' absurdo, de tiu malluma nenio, kiu vin vokas per maltrankvilo kaj nostalgio el via propra esto.

Sed vi estas solene veka kaj vi vidas la maleblon reveni de la ĉio al la ero. Vi estas en infero de paco. Kaŝi malgajon, sepulti doloron per koito, per socia agado, per drinko, per tio nomita "religio", per tio nomita "politiko", per kiu ajn el la sennombraj ŝoveliloj, kiujn ni uzas, similas enterigon de semo, kiu neeviteble eksplodos pro centoj da neviditaj radikoj de novaj doloroj, de novaj malgajoj. Alfrontu doloron. Ne respektu ĝin. Ĝi mortu nun, kiam ŝprucanta, ĉar per la unua ŝovelaĵo de distro aŭ konsolo vi nur riĉigas dolor-fekundecon. Frakasu la dolor-semon, kontaktante malgajon nuntuj per la armiloj plej malfacile forĝeblaj: kvieto kaj silento.

Vi devas alfronti la esencon de via problemo. Lerni bru li pro via propra trankvilo, bruli ĉiusekunde en la sankta arto kaj malfacila scienco de via propra silento. Lerni la neelĉerpeblan lecionon de via silento.

34. Heredo

Malnova homo ne ŝatas la novan mondon. Nova homo suferas antaŭ malnova homo. Sed ne temas pri ŝato nek pri sufero. Ankaŭ ne pri kontento aŭ feliĉo. La problemo estas preter ĉiu limo. Temas pri morto aŭ pri vivo de homo. Temas pri daŭrigo de la vojo de malnova homo al aŭtomateco, rigideco, malpermeso, mineraliĝo, nekonscio, aŭtoritato, periodaj militoj, psikosomata malsano kaj morto.

Aŭ pri regenero de la homspeco en oni mem, por ke ĝi sekvu la vojon novan al amikeco, flekseblo kaj komprenkapablo, al la konscio, la kunlaboro laŭvola, daŭra paco, totala sano kaj vivo.

Temas pri la morto en oni mem de ĉiuj elementoj de la malnova homo, kiujn ni heredis mense kaj korpe. Identigi tiujn malnovajn elementojn, kiuj ĉiumomente sin manifestas en nia esto, en agoj, en pensoj kaj ĉefe en nia parolo, estas la plej urĝa tasko, kiun konvenas entrepreni. Kaj krome rimarki la nekongruon de malnova homo, kiu poras aŭtomatecon, aŭtoritaton, militon, malpermeson kaj morton en la nomo de la "nova homaro".

Ĉiu nia vorto kaj ago estas testamento. Ĝi ne estu la sama, kiun ni heredis de malnova homo. Ni donu amikecon. Ni amu sen timo kaj sen kialo, per vortoj, per agoj kaj per silento. Ni amu, ĉefe se ni ne ricevis amon.

Ni estu amikemaj, amemaj, afablaj, ĉar tio estas la ĉefa kuracilo kaj precipe ĉar ni heredis tre malmulte da tio.

Ni heredigiu amon kaj amikecon. Ne estas vojoj nek metodoj por alveni al la luma vojo de la amo. Ĝi alvenas kiam oni mem decidas malfermi la okulojn kaj marŝi. Jam tuj. Ni detruu nian heredon de malpermesoj kaj ni testamentu nur liberecon. Donu ni liberon. Ni estu liberaj. Nur tiel kreskos la kapablo identigi kaj aŭskulti ĉiujn novajn homojn el ĉiuj epokoj sen distingo, kaj ĉiuj iliaj veroj fariĝu hodiaŭ en ni mem unusola vero. Ĉi tie.

35. La nova homo

Povas esti viro aŭ virino. Povas havi horloĝon. Povas ne havi ĝin. Sed lia menso liberiĝis de la tempo. Povas havi aŭ ne havi. Sed li liberiĝis de ambaŭ cirkonstancoj. Li vivas en la mondo, en kiu ajn lando, sed li (ŝi) ne apartenas al unu nek al alia. Ne aranĝas gruperevoluciojn armitajn. Li (ŝi) realigas la revolucion en si mem, kio estas pli kuraĝa kaj multe malpli komforta. La nura rekta revolucio. Ĝi estas ĉiumomenta revolucio, en lia domo, laŭ la strato, en lia laboro, eĉ sur la mortolito, se li bedaŭre ne komencis antaŭe. Li ne petas regulojn, nek ekzemplojn, nek konsilojn. Li ankaŭ ne donas ilin. Li ne serĉas ĝojon, li ĝin vivas sen atendi ĝin. Li ne serĉas emociojn. Li (ŝi) trovas la eksterordinaron de la vivo

en ĉiu momento, en ĉiu loko. Lia templo estas en lia haŭto kaj en la templo estas tio, kion eĉ ne li mem, malgraŭ provegoj, povas esprimi.

Li (ŝi) estas granda politikulo. Li konstruas senintence novan homaron, unuigitan homaron. Li politikas per ĉiu amikeca gesto, per ĉiu afabla rideto, per ĉiu ago. Ĉiumomente. Ĉiuloke.

Li konsentas nenian diskriminacion inter homoj. Li ne deziras sekurecon. Li scias, ke, serĉante ĝin, oni ĝin perdas. Oni posedas ĝin en ĉi tiu momento mem, senvole. Li forestas de la bruo. Li scias, ke ĝi lin detruas eĉ "materie" (organike). Li konas sian psikobiologian ritmon. Li respektas ĝin. Li trankvile malpermesas, ke tiu ritmo perturbiĝu. Li scias, ke ĝi facile perturbiĝas pro ekscitaj aŭ stultaj konversacioj, pro amastelevido aŭ pro komerc-propaganda radio, pro konkuro, akiremo, akumulo, pro analizo, interpreto kaj kondamno (aŭ manko de reciproka akceptemo). Li (ŝi) akceptas sin tia kia li (ŝi) estas. Li ne deziras la ŝanĝon ĉar li scias ke, estante viva kaj veka, li ne estos la sama en ĉiu momento. Li konas siajn organikajn bezonojn. Li ne daŭre "konsumas". Sufiĉas natura satigo, trankvila kaj ĝoja, de tiuj bezonoj. Li (ŝi) simple protektas sian vivon. Senkondiĉe protektas la vivon. Li povas havi edzinon (ŝi edzon). Li povas ne havi edzinon. Ĉiel li liberigas kaj akceptas alies liberon. Li ne havas rajtojn nek devojn. Ago ŝprucas spontane el totala akcepto, t.e. el amo. Liaj rilatoj estas stabilaj ĉar sanaj. Estas rilatoj de amo, de totala, neintenca akcepto.

Li ne povas pensi, ke amrilatoj havas finon (tial ke li konas la amon) nek ke estas rilatoj, kiuj persistas nur pro rajto aŭ pro devo. Li neniam atendas, ke alia saltu unue. Li mem saltas sen deziri esti la unua, kiu saltas. Li ne interrompas sian vekigon eĉ dum la dormo. Nova homo solas kaj li tion scias. Li solas eĉ en la hom-amaso. Sola en la vivo kaj dum la morto. Sed li ankaŭ scias ke lia destino estas ĉies destino. Kaj ke ĉies destino estas la propra destino. Tial li rimarkas, ke per propra libero vera kaj per propra regenero, ĵus komenciĝis libero kaj regenero de la tuta homaro.

